# Virinoj en la Esperanto-Movado

Stefan MacGill, oktobro 2023

AMO-seminaro 103 en pola-itala kunlaboro; oktobro 19, 2023.

La seminaria temo: Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon

# Pioniraj virinoj

- :
- **Klara Zamenhof, 1863-1924**
- Naskiĝis en Kaunas, Litovio kun la nomo Ŝibenik. Ŝi edziniĝis kun Ludoviko Zamenhof, kaj aktive laboris por la lingvo, kiun li kreis. Ili kune havis tri infanojn: Adam, Lidia kaj Zofia. Ŝiaj gepatroj estis bonstataj, kaj Klara sukcesis alportigi sufiĉan monon por eldoni la Unuan Libron de Esperanto, per kiu Zamenhof prezentis sian lingvon al la mondo. Ŝi subtenis la instruan kaj prelegvojaĝan agadojn de la filino Lidia. La foto prezentas ŝin en la 16-a Monda Kongreso de Esperanto; ses monatojn post tio ŝi mortis.



# Pioniraj virinoj:

- **Lidia Zamenhof, 1904-1942**
- La filino de Ludoviko Zamenhof bone regis la lingvon kaj vojaĝis vaste por gvidi rektmetodajn kursojn. Entute Lidia gvidis diverslande pli ol 50 kursojn, multe tradukis (ekzempe Quo Vadis) kaj kontribuis al revuoj (ekzemple Literatura Mondo).
- La nuna verkinto vizitis en 1976 la mezfrancan urbon Thiers por prelegvojaĝi laŭ la tiama skemo de UFE, la landa asocio de UEA. Lidia restis plurajn tagojn en 1938 kun la loka klubo kaj tie gvidis kurson, kiu altiris grandan publikon. La kluba sidejo havas vitrinan ekspozicion pri la restado kaj agado de Lidia.  Lidia kvin jaroj post tio pereis en la holokaŭsto.
- Pri Lidia prelegos Matha Otto en la seminario.



# Pioniraj virinoj:





- **Teru Hasegawa (Verda Majo), 1912-1947**
- Japanino, kiu pioniris en la transnaciaj kontaktoj per Esperanto, en tempo kiam la grandmondaj rilatoj inter landoj fariĝis ĉiam pli streĉaj. Naskiginta en Nara, Japanio, ŝi edziniĝis kun manĉuriano kaj trasloĝis al Ĉinio, kie ŝi agis kontraŭ la japana okupado de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ŝi plenumis radio-elsendojn direktitaj al japanaj trupoj. Ŝi verkis abunde laŭ ŝia pacisma vidpunkto.
- Ŝi verkis ankaŭ en Esperanto, sed tiu libro ne plu estas havebla en la libroservo de UEA.



# Virinoj de la nuntempo

* **Claude Nourmont, Luksemburgo:** (1945-2022)
* Vic-prezidanto de UEA (2004-2013).
  Honora prezidanto de TEJO; redaktoro *de Le Monde de l'espéranto*, dulingva magazino de UFE.



* **Mirejo Grosjean, Svislando** (1946-)
* Prezidanto de ILEI (2013 - 2021)
* ILEI de jaroj havas plimulton de virinoj en sia estraro.
* Nun 5 el 8 estaranoj estas virinoj.
* Gajnis ls premion Deguĉi en Nitra, 2016
* Honora Membro de ILEI kaj la Svisa Esperanto-Societo
* Havas ampleksajn kontaktojn kun afrikaj esperantistoj



# Virinoj de la nuntempo:



- **Barbara Pietrzak, Pollando (1944- )**
- Ĝenerala sekretario de UEA (2007-2013).
- Prizorgadas la Polan Retradion en Esperanto ekde 2011.
- Akademiano ekde 2011.

**Michela Lipari, Italio**
Estrarano de UEA pri kongresoj (1992-2004)
Plurjara prezidantino de Itala Esperanto-Federacio.

